



LINGVO INTERNACIA

Monata gazeto por la lingvo Esperanto.


REDAKCIO

Paris

27 Boulevard Arago 27

PAUL FRUICHTIER

ĉefredaktoro.



ADMINISTRACIO

Szegárd

Hungarujo (Hongrie)

PAUL DE LENGYEL

direktoro.

Ĉiuj klarigoj pri abono, anoncoj, manuskriptoj k. c. estas sur la lasta paĝo.

PRI NIA SEPA JARO.

Kun niaj plej koraj kaj sinceraj bondeziroj, kiujn ni estas feliĉaj prezenti al la legantoj de *Lingvo Internacia* okaze de l' komenco de nia sepa jaro, ni alportas gravan sciigon pri nova ŝanĝo de redakcio. Sinjoro Paul de Lengyel, kiu prenis sur sin la tutan ŝarĝon de l' redakcio, administrado kaj presado de L. I. post la neforgesita eksigo de Sinjoro Paul Nylén, malgraŭ sia bonvolo tute ne povis havi sufiĉe da libera tempo por sola eldoni nian tutan ĵurnalon. Tial li devis peti por helpo, kaj forlasi la Redakcion kiun de nun prenas Sinjoro Paul Fruictier. Ni tre esperas ke tiun ĉi ŝanĝon aprobos la legantoj de L. I., kaj ke ili daŭrigos helpi nin per siaj abonoj, artikoloj, konsiloj kaj propagando.

Kompreneble, nia celo kaj nia programo restas neŝanĝitaj; ni do, kiel antaŭe, daŭrigos sciigi nian legantaron pri propagando kaj aliaj Esperantistaj aferoj, kaj povos esti la ligilo, kiu unuigas la Esperantistojn disajn en la mondo. Samtempe, ni intencas iom pligrandigi nian kampon, kaj petas, niajn le-

gantojn, ke ili volu sendi al ni, kun literaturaj kaj amuzantaj verkoj, artikolojn pri ĉio ajn (sciencoj, geografiaĵoj, novaĵoj, teatro, muziko, pentrarto, sportoj k. t. p.) kion ili faros, vidos, aŭdos aŭ legos en sia lando, kondiĉe ke tio ĉi povu interesi internacian netehnikan publikon.

Oni do volu de nun sendi ĉiujn manuskriptojn al la nova redaktoro en Parizo, kaj sin turni nur por administrado al sinjoro de Lengyel. Tamen, tiu ĉi lasta daŭrigos gvidi la enhavon de l' Rubrikon «Diversaĵoj» t. e. Rebusoj, Problemoj, Vortludoj k. t. p., kaj petas ke, pri tio ĉi ankaŭ oni sin turnu al li.

Pri pli detalaj klarigoj — oni volu vidi la lastan paĝon de l' gazeto.

Nun, ke la legantoj de L. I. helpu kaj subtenu nin! Ili povas esti certaj, ke nia bonvolo ne mankos.

La Redaktoro

Paul Fruictier.

L' Administranto

Paul de Lengyel.



Esperanto dum la pasinta jaro.

Nedisputeble oni povas diri, ke la unua jaro de la XX-a centjaro komencis por Esperanto periodon tute prosperan kaj kuraĝodonan, kiun oni povas konsideri kiel antaŭsignon de proksima kaj plena sukceso de nia entrepreno. Tial ne estas seninterese ekrigardi malantaŭen, kaj tiri el la faritaĵoj lecionon por la estonteco. Tiamaniere ni povos kiel eble plej bone celi la plej mankajn partojn el nia propagando.

Ĉar de l' Nordo venis al ni la Esperanta Lumo, ni do esploru unue la Nord-eŭropajn landojn. En **Rusujo** ni trovas la jam malnovan societeton «Espero» kiu preparas sin baldaŭ festi la dekan datrevenon de sia fondo. Pri tio nur povas ĝoji ĉiuj Esperantistoj; ĉiu pasinta jaro alportas ja al la fundamento de nia entrepreno novan ŝtonon, montrante ke Esperanto, anstataŭ malfortigi kaj forgesiĝi kiel aliaj sistemoj, anstataŭ esti difektata kaj detruata de Tempo, kontraŭe ĉiam pli kaj pli kreskas kaj fortikiĝas, nova Egipta piramido kiu mokas jarojn kaj malamikajn klopodojn de homoj.

Dank' al la sindonema fervoreco de Rusaj Esperantistoj, nia ideo transirinte **Sibirujon**, nun komencas enradikiĝi en la plej orientaj partoj de **Azia Rusujo**, en *Vladivostok*, *Ĥabarovsk*, *Port-Arthur* k. t. p., pli sude, en *Tomsk*, — kaj eĉ eniris **Hinujon ĝis Mongolujon**.

Sed ni revenu Eŭropon, kaj tra *Voroneĵ*, *Kazan*, *Kharkov*, *Melitopol*, *Odessa*, *Minsk*, *Reval*, *Dorpat*, *S.-Peterburg* k. a., kie fondiĝis aŭ filialoj de «Espero», aŭ kursoj pri Esperanto, kie estas aŭ faritaj paroladoj, aŭ eldonitaj broŝuroj pri nia lingvo, ni atingu **Svedujon**.

Tie ni trovas ageman propagandon, tiom pli efikan, ke ĝi estas furata en lando malpli vasta ol Rusujo, ke Esperantistoj pli bone povas unuigi kaj apogi unu sur la alia, ilin ne malhelpante tro granda diseco. — Tie ĉi reorganizigis klubo en Upsala, tie multe plifortiĝis klubo en Stockholm, aliloke fondiĝis nova Societo, kiu regule presigas Esperantan tekston en sveda ĵurnalo (*Södertelge Tidning*). Oni do senpene komprenas, ke gazeto povis presi tiun fortodonan sciigon, ke «23 kursoj pri Esperanto estas farataj nur en svedaj societoj de Sobrigistoj»; oni ĝojas senmire ke la tiel grava kaj multepova societo «Sveda Turista Ligo» petis pri Esperantistaj korespondantoj en fremdaj landoj, por ke ĉiuj ĝiaj membroj povu pli oportune uzi Esperanton dum siaj vojaĝoj.

Ceterc, tiu decido de Sveda Turista Ligo ne estas tro frua, kaj ĝiaj membroj povos uzi Esperanton kun granda profito, se ili vojaĝos en **Centra Eŭropo**, pro la propagando tie farita dum la pasinta jaro. En **Holando** fariĝis tute nova, sed tamen tre grava movado pri nia lingvo. La eliro de lernolibro por Holandanoj akcelis tiun movadon en tiu ĉi lando, kie nomo de Esperanto estis antaŭ nelonge preskaŭ tute ne konata. La tienaj gazetoj portis propagandon ĝis en la partoj de **Hindujo** kaj de **Oceanio**, kie oni uzas Holandan lingvon; adeptoj jam fariĝis tiel multaj, ke fondo de klubo estos kredeble tre baldaŭa. Tiel tiu lando nenion plu havas por envii, rilate al sia najbaro: **Belgujo**, kie la Esperantista Sekcio de Poliglota klubo

en Bruxelles, ĉiam daŭrigas sian efikan agadon. La Belgaj Esperantistoj aranĝas nun sekeion apartan pri la problemo de la lingvo internacia en la Ekspozicio farota en *Anvers* dum venonta majo, de la Reĝa Societo de Geografio. Ili preparis la sukceson de l' dirita ekspozicio per daŭra agado inter la presistaro, kaj sendube, ĝi estos plena triumfo por Esperanto. Eĉ **Luksemburgaj** ĵurnaloj parolis pri nia afero, kaj en **Germanujo** ankaŭ ni trovas kelke da bonegaj artikoloj publikigitaj de nia partiano. Bedaŭrinde ŝajnas ke malfeliĉa Sorto batalas kontraŭ ni en tiu ĉi lasta lando. La tieaj Esperantistoj, kvankam ili estas ĉiam tiel fervoraj kiel en la unua tempo, ne ricevas ĝustan premion por siaj meritoj. Jam tre disaj, ili ankoraŭ pli malorganiziĝis pro la malapero de du homoj el la plej oferemaj por nia ideo: S-roj *Einstein* kaj *Trompeter*, kies morto funebriĝis tutan Esperantistaron, kies memoro devas restadi en ĉiuj niaj dankaj koroj.

Feliĉe, se Germanujo restas ankoraŭ preskaŭ tuta ekster nia influo, **Aŭstro-Hungarujo** estas en tre malsama stato. *Welt-Correspondenz*, organo de internaciaj rilatoj en *Wien* akceptis nian lingvon kune kun germana, angla, franca k. u., kaj tio ĉi estas antaŭsigno de l' baldaŭa aliĝo de l' tieaj germanaj gentoj. Sed multe pli grava movado fariĝis en la aliaj pli orientaj partoj de tiu ĉi imperio. En **Bohemujo**, en **Moravujo** tri sindonemaj Esperantistoj elverkis lernolibron, kiu pligrandigis ĝis 21 la nombron de l' lingvoj, kiuj estas en nia aga kampo. Ilia propagando multe sukcesis, preskaŭ pli ol oni povis esperi: ĵurnaloj presis artikolojn pri nia afero; paroladoj, kursoj estas faritaj en diversaj urboj, eĉ en tute speciala mondo, inter laboristoj; gazeto en *Prago* (*Novy Kult*) uzas regule Esperanton; kaj oni povis vidi tiun grandsignifan kaj ĝojigan fakton: la fondo de l' unua societo de Aŭstraj Esperantistoj en *Brno* (*Brünn*), kies multaj membroj estas precize tiuj laboristoj, kiujn oni volis prezenti al ni kiel homoj tute ne atingeblaj de Esperanto pro la tro granda malfacileco de nia lingvo (1) kiu, pretendas malefektiva kaj malutila amiko de nia ideo, «tro postulas de l' Racio, kaj ne sufiĉe de l' Memoro!»

Estas senutile insisti apud legantoj de L. I. pri la propagando, kiu estas farita en **Hungarujo**. Ni do diru nur ke tie ankaŭ, ĝi estis prospera, tiel ke fervoraj Esperantistoj kredas, ke ili baldaŭ povos komenci fondon de nova societo. Sed ni lasu al niaj legantoj la estontan kaj agrablan surprizon sciigi pli detale pri tio, kaj ni atingu alian landon, kie ankoraŭ ni trovos bonegajojn.

Kaj ja, en **Bulgarujo**, Esperanto tre disvastiĝis dum la 1901-a jaro, dank' al la nova lernolibro por Bulgaroj, kaj al la novfondita Societo «Stelo» en Plovdiv (Filipopli). Multaj paroladoj havis grandan sukceson en *Rusĉuk*, *Ŝumla*, *Razgrad* k. a.; broŝuroj diversaj estas publikigitaj, kaj du ĵurnaloj uzas regule Esperanton (*Novosti* en Plovdiv, kaj *Svet* en Rusĉuk). Alia eldonas lernolibron por Grekoj. Unuvorte, aperis ke Esperanto kreskas en tiu ĉi juna nacio, kiel peza tritiko en nova kaj fruktodona tero, kaj estas permesite esperi, ke baldaŭ alvenos la tempo por belega rikolto.

Se ni turnas nin al la latinaj nacioj, ni vidos ke movado pri Esperanto multgrandiĝis, precipe en **Francujo**, kaj ke tre kredeble ĝi disvastiĝos el tiu ĉi lando en

Italujon, Hispanujon kaj Portugalujon. En **Francujo**, dank' al l' aliĝo de multaj eminentuloj el la profesorado, matematikistoj, literaturistoj, lingvistoj, leĝoscienculoj, kuracistoj k. t. p., — dank' al ĵurnalistoj, sportistoj, komercistoj, ni vidis du Akademiojn favore akceptantajn nian Lingvon. Komunumoj, du aŭ tri urboj kaj multaj diversaj societoj, kies nomaro estus tro longa, aliĝis al la SOCIETO POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO, kies membroj, kiuj estis 435 en decembro de 1900-a, estas hodiaŭ ĉirkaŭ 1000. — La multepova societo Touring-Club kun 70000 membroj subtenas nin per sia influo, sia revuo, sia mono, kreis kursojn, kaj proponis ĉe si societan sidejon al la Grupo Esperantista Pariza. Paroladoj, kursoj estas faritaj iom ĉie en Francujo, broŝuroj eldonitaj, kaj bonegaj artikoloj presitaj en la plej gravaj ĵurnaloj. — Grupoj fondiĝis en *Dijon* (130 m.), *Besançon* (80 m.), *Nice* (40 m.), en *Paris* (150 m.), en la *Valo de Giffre* k. a.; komercistoj, diversaj ĵurnaloj kaj revuoj uzas kutime Esperanton por siaj aferoj, kaj oni povis vidi Klubon Esperantistan enloĝigi «la Sorbonne»-on (Fakultato scienca kaj literatura) kaj aŭdi Rektoron premi Esperanton kiel temon por paroladi, okaze de solena kunsido de Universitata remalfermo.

Tial ne estas mirige, ke la ĉie konata firmo Hachette k. K-io konsentis eldoni Esperantajn librojn, kaj kontrakti pri tio kun D-ro Zamenhof. Ĝi komencis je nova lernolibro por Francoj, kies 1500 ekzempleroj vendiĝis nur en tri semajnoj, kaj enpresis bonegan artikolon en la tre legata «Almanach Hachette».

Kompreneble, inter tiaj estantaĵoj, alia entrepreno, naskita de la ĉefaj kongresoj dum l' Ekspozicio Universala en 1900, jam konata de niaj legantoj, nome: «Delegacio por elekto de Lingvo internacia artefarita» paralele kreskis kaj disvastiĝis en Francujo kaj en aliaj landoj, Svedujo, Anglujo, Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko, ekzemple. La agado de la Esperantistoj faciligas al ĝi la vojon, kaj pro la komuneco de celo, la du entreprenoj devige apogas sin iom unu sur la alia, kvankam «Delegacio» devas resti neŭtrala, kaj ne ankoraŭ aliĝi partion. Tial, aŭtoro de alia sistemo, provinte kredigi ke «Delegacio» lin favoras, ricevis energian kontraŭdiron. Tamen, kiel oni povas ĝin senpene diveni, ĉar Esperantistoj estas de tie malproksime la plej multaj kaj plej fortike organizintaj el ĉiuj partianoj de Lingvo internacia artefarita, ili sekve estas ankaŭ plej multaj el la «Delegatoj», kaj oni povas esti certa, ke tiu ĉi entrepreno estos ankoraŭ plena triumfo por Esperanto.

Bedaŭrinde, en aliaj nacioj latinaj, Esperanto ue estas ankoraŭ tiel konata, kiel en Francujo. Ni tamen devas citi kelke da bonegaj artikoloj, presitaj en ĵurnaloj, en Norda **Italujo**, en Franca kaj Itala **Svisujo** kaj en **Hispanujo**. Kontraŭe, **Sudamerikaj latinaj gentoj** komencis eniri la mondon Esperantistan, kaj niaj legantoj tre certe memoras pri la agema propagando en **Brazilujo**, kie multaj ĵurnaloj kaj Brazilo-Portugala «Almanach Lembranças Luso Brasileiro» parolis pri nia afero. Aliparte nova lernolibro por Hispanoj estas eldonita kaj jam tute elvendita en **Perulando**. Serio da sukcesaj paroladoj publikaj estas farita en la Scienca Fakultato en *Lima*, kun oficiala permeso de l' registaro, kaj bonegaj

artikoloj presitaj en diversaj ĵurnaloj de **Perulando** kaj **Ŝililando** varbis multajn adeptojn al nia afero.

Nur restas al ni esplori Anglo-Saksajn naciojn, antaŭ ol fini nian tro longan, aŭ pli bone «feliĉe longan» vojaĝon tra Esperantistaro.

Bedaŭrinde en **Anglujo** mem, ni ne havas multe da gravaj propagandfaktoj por enpresii, krom kelke da artikoloj en diversaj gazetoj, kaj la prezento de Esperanto antaŭ la Komerca ĉambro en *Keighley* farita de unu el niaj sindonemaj partianoj. Sed, en Norda Ameriko, en **Kanado**, fervora juna grupo de Esperantistoj naskiĝis, kiu fondis klubon en *Montreal*, kaj eldonis la ĵurnalon «*L'Espérantiste Canadien*», baldaŭ fariĝintan bela trilingva Revuo, «*La Lumo*». — La movado rapide eniris **Unuigitajn Ŝtatojn**, kie kelkaj ĵurnaloj, aparte en *Chicago* sin okupis favore pri nia afero, kaj altiris multe da demandoj. Ni esperu, ke tiu tiel miriga kaj fruktodona lando baldaŭ aperos kiel unu el niaj plej fortaj subteniloj. La reeldono de lernolibro por Anglolingvuloj, antaŭ nelonge farita, kredeble tre helpos niajn tieajn partianojn, kiuj havas malfermatan antaŭ si, tiel belan kaj vastan kampon.

Ni citu ankoraŭ **Meksikujon, Novan Kaledonion, Persujon, Turkujon, Rumanujon, Tunizion, Alĝerion, Portugalujon, Islandon, Danujon, Norvegujon**, kie niaj amikoj ne lasas teren fali standardon de Esperanto, — kaj ni vidu konklude tion, kio restas al ni por fari.

Kio restas al ni por fari? Grandegaĵo! Certe ni eliris el la ombro, el la nokto, kie vivis unuaj Esperantistoj, sed precize ĉar stelo nia komencas lumiĝi kaj brili, estas tute necese ke de nun ĝi ŝajnas ĉiam pligrandiĝi al la homoj kiuj rigardas ĝin. Ni ne havas la rajton, eĉ la eblon halti nur unu minuton, kaj se estas vera tiu aforismo, ke «ne la venko estas malfacila, sed la konservado de l'akiritaĵoj», ni ne havos la tempon por halti. Kian lecionon ni povas eltiri el la nuna stato de Esperanto en la mondo? Nur unu: neceseco de nedisigebla unuiĝo kaj de nelacigebla propagando. Vidu en kiaj landoj Esperanto aŭ kreskiĝis, aŭ nur ne malgajnis: nur en la lokoj, kie ekzistas areto da homoj volemaj, agemaj, unuiĝintaj, kiuj bone scias kion ili volas kaj celas, kien ili iras. Estas vere, ke malgranda nombro da homoj decidiintaj ne povas aliformigi la mondon. Nu, estas necese ke ĉiuj Esperantistoj, homoj, Kluboj, Grupoj, Societoj, ĉiam pli kaj pli unuiĝu kiel eble plej intime. Kiel oni diras france: «Ni maldisigu niajn kubitajn.» Ni pligrandigu interrilatojn inter ni; niaj Grupoj komuiku unuj al la aliaj siajn intencojn, ĵurnalojn, librojn, propagandrimedojn kaj sciigojn. Klopodu ni por altiri al Esperantistoj, por faciligi al ili fremdajn laborojn kaj oficojn, pligrandigon de komercokampo, por ke homoj fine «palpu» la profiton, kiun ili povas eltiri el lingvo internacia. Ni ne laboras por unu aŭ du homoj, nacioj aŭ landoj, — ni laboras nur por Esperanto, t. e. por la tuta homaro; do, for de ni disputojn, politikajn, religiajn aŭ naciajn problemojn, personaĵojn! Ni konservu niajn opiniojn por nia ĉiutaga vivado, sed tion ĉi ni forgesu, kiam ĝin postulas Esperanto. Ni uzu nian influon personan sur niajn amikojn, ni varbu ilin, ne konfidante aliajn, sed nur nin mem; ke niaj komercistoj, scienculoj, literaturistoj, vojaĝantoj uzu ĉiu

siajn amikojn, ĉiujn okazojn por disvastigi Esperanton; ke ili klopodu precipe varbi adeptojn kaj ilin unuigi en la landoj tiel gravaj por ni, kiel Germanujo, kiel Anglujo, kiel Aŭstralio, k. t. p. k. t. p., kie Esperanto preskaŭ ne ekzistas ankoraŭ! Sed por tion fari, *estas necese, ke ni estu kredantoj*, kaj ke *ni montru ke ni estas tiaj*, ĉar nur *kredo konvinkas*, ĉar nur kredo povos tute rompi la barilojn jam diskarakadantajn kaj disiĝantajn, kiuj ankoraŭ haltigas en ĝia kuŝujo la riveregon ŝaŭman kaj ondoplenan, kiu baldaŭ trafalos kaj aliformigos la mondon, kiel faris antaŭe vaporo.

Paul Fruictier.



Nova hipotezo pri la finiĝo de l' mondo.

Libro, kiu faras en la nuna tempo grandan impreson, kaj naskis disputadon inter multe da scienculoj, estas la lasta verko de S-ro Lewis «*The Great Glacial Deluge and its impending Recurrence.*» Pensinte ke la problemo esplorita de tiu aŭtoro povos interesi legantojn de L. I., ni provos resumi liajn teorion kaj ideojn.

S-ro Lewis entreprenis klarigi, laŭ kia maniero kaj pro kia kaŭzo tre baldaŭ finiĝos la nuna periodo de Tero.

«Ho!» vi ekkrias, «la finiĝo de l' mondo! Tio ĉi estas ŝerco! De l' tempo, kiam oni parolis pri tio por la unua fojo, oni neniam ĝin vidis.»

— Jes! vi estas prava, kara leganto, oni neniam ĝin vidis; sed tio ĉi ne estas argumento, de kiu oni povas konkludi, ke oni neniam ĝin vidos. Eĉ ekzistas tute certa fakto: la steloj, planedoj, ĉiuj ajn astroj posedas propran vivon. Iom post iom, laŭ la estingigado de ilia interna fajro, ilia vivo ankaŭ malpligrandiĝos, kaj, fine, ĉesos. Tion ĉi montras al ni ekzem-

ple Luno, tiu glacia mondo astronomia, planeda mortintaĵo.

Sed, mi tute ne intencas priskribi la turmentojn de l' lastaj teraj vivontoj, kiam ili plu ne povos efike batali kontraŭ la fina, terurega malvarmo. Tre kredeble, jam de longe, de tre longege estos forgesitaj niaj nomoj, memoro, kaj civilizacioj, kiam okazos tia stato. Miaj antaŭdiroj estus tre certe... kiel mi diros?... iom tro antaŭaj. Sed oni povas antaŭvidi multe pli baldaŭan finiĝon de l' mondo, kiu, kvankam ĝi kredeble minacas ne nin mem, sed nur niajn nepojn aŭ postnepojn, meritas tutan nian, bedaŭrinde senpovan atenton.

Vi sciias, ke la antikvuloj kredis, ke la mondo ĉiam rekomencas saman historion kaj staton post ĉiu periodo da 30000 jaroj. Eĉ, en unu el la klasikaj aŭtoroj troviĝas amuzanta rakonteto pri tiu ĉi kredaĵo. Kelke da junuloj, diboĉinte en restoracio, alvokis la mastron, kaj, antaŭ ol lin pagi, alparolis lin laŭ la sekvanta maniero:

«Vi nepre kredas», ili demandis, «ke la historio de l' mondo rekomencos post 30 000 jaroj?»

«Ho! Tre certe, sinjoroj!» respondis la mastro.

«Tre bone! Sed, ĉar sekve ni ree venos manĝi ĉe vin post tiu spaco da tempo, estas tute neutile, ke ni pagu vin hodiaŭ. Enskribu nur nian ŝuldon en nian kalkulon, kaj ni pagos vin, kiam pasintaj estos la plej proksimaj 30 000 jaroj.»

«Tre volonte, sinjoroj,» respondis sprite la mastro. «Sed ĉar vi jam diris al mi saman aferon *antaŭ* 30 000 jaroj, vi devas pagi al mi hodiaŭ la *tiaman ŝuldon*.»

Vera aŭ ne, tiu anekdoto bone montras ke, jam de longa tempo, homoj opiniis, ke la vivado de Tero estas dividata en diversaj periodoj. Oni trovas saman opinion en la Sanktaj Libroj Hindaj, kie oni povas legi ke, «post ĉiu periodo da 25 000 jaroj, teruraj katastrofoj okazas, kiuj, per akvo aŭ per fajro, tute ŝanĝas kaj aliformigas la mondon, kaj detruas ĉian ajn vivajon sur la tero. Nur supervivas «Brahmanoj» kiuj loĝas sur la monto «Himalaja». Tiuj «Brahmanoj» gardas la Sanktajn Librojn, konservas la tradiciojn, kaj poste naskas la novajn gentojn kiuj disvastiĝas tra la mondo.»

Oni povas malfacile vidi en tiaj diroj ian neklaran eksciaĵon pri la geologiaj periodoj de Tero. Unuj pensas, ke tio estas nur superstiĉo sensenca, — aliaj, kontraŭe, ke la Sanktaj Hindaj Libroj estas pravaj, almenaŭ parte. Laŭ tiuj ĉi lastaj homoj, glaciaj, varmaj kaj varmegaj periodoj sekvas regule unu la alian sur nia planedo. Eĉ, kelke da scienculoj provis klarigi tiujn duonsupozitajn fenomenojn per balancado tre malrapida de l' akso de Tero.

Estas tiu kaŭzo, kiun S-ro Lewis pre-

tendas, ke li trovis. Laŭ lia teorio, pro la baldaŭa disiĝo de l' grandegaj amasoj el glacio kiu troviĝas ĉe Suda Poluso, estas alvenonta nova glacia periodo. Montoj el glacio enfalos la maron, ĝin malvarmigis, kaj forpelos ĝiajn ondojn al la norda duonsfero. Tiu grandega kolekto da malvarmega akvo kuros alfrapi la glacian barilon de Norda Poluso, revenos malantaŭen, kaj tiel subakvigos plej grandan parton de Eŭropo, Norda Ameriko k. t. p.

Tiu ĉi antaŭdiro ŝajnas stranga. Tamen, l' aŭtoro apogas sin sur tre certaj faktoj dubigantaj ĉu li ne estas prava. Cetere, la legantoj povos konvinkiĝi pri tio, se ili konsentos iom esplori kune kun ni la topografion de Suda Poluso.

Oni scias, ke Suda Poluso konsistas el vastega tero, kovrata de grandega «ĉapo el glacio». Grandega, oni povas tion ĉi facile kredi, ĉar meza larĝeco de tiu ĉi kolosa glaciejo estas je 4 aŭ 5000 kilometroj, kiel tuta Norda Ameriko!! Pri ĝia alteco, ĝi mezuras 3 aŭ 4 mil metrojn ĉe l' periferio, kaj *dekkvin* aŭ *dudek kilometroj* en ĝia mezo!!! Nenian monton oni povas kompari kun tia amaso da glacio. Andoj mem estus infanoj apud nia glaciaro, kun iliaj mizeraj 8000 metroj da alteco, kaj oni devas iri ĝis en Luno por trovi tre malproksime similajn montojn.

Laŭ la rakontoj de l' ticaj esplorintoj, la bordo de tiu ĉi glaciejo aperas kiel muro el glacio, ĉe kies piedo ĉesas libera maro, kaj pro kiu estis ĝis nun tiel malfacile alproksimiĝi la Poluson.

Senĉese pligrandiĝas tiu glacia kolekto. Du ĉefaj kaŭzoj produktas tiun ĉi fakton. La unua estas, ke la ondoj de l' tri oceanoj kiuj ĉirkaŭas Sudan Poluson, nome: Atlantiko, Pacifiko kaj Hinda Oceano, estas ĉiam, apud la supredirita muro, je kelkaj

gradoj termometraj sub la temperaturo de akvoglaĉiigo. Tuj kiam saltantaj ondoj alfrapas la muron, ili subite glaciigas, kaj tiel konstante pligrandigas la glaciejon.

Aliparte, neĝo ĉiam aŭ preskaŭ ĉiam faladas en tiu regiono. Ĉiuj vojaĝintoj certigas, ke ĝi falas almenaŭ dum 28 tagoj en ĉiu monato; kaj ĉar ekzistas nenia elvaporigo, nenia pluvo, nenia roso, oni povas sen peno diveni kio fariĝas tiu grandega kvanto da neĝo, kiu faladas kaj kolektiĝas de miloj da jaroj, po tricent kvardek tagoj en ĉiu jaro. Ĝi fariĝas ankaŭ iom post iom glacio densa, laŭ fenomeno bone konata de fizikistoj.

S-ro Lewis klarigas per la formado kaj ekzistado de tiu ĉi glaciejo la nunan aranĝon de l' kontinentoj kaj maroj sur nia planedo. Multe pli da teroj ekzistas ja en la Norda duonsfero ol en la Suda, kiu enhavas nur Sudan Amerikon, Sudan Afrikon, Aŭstralion, kaj kelke da disaj insularoj. Tiu stato devenas de l' formado de nia Polusa glaciejo, kiu de 25000 jaroj altiris al si plej grandan parton el akvoj en la Norda duonsfero, kaj tiel permesis al la tiaj kontinentoj superakviĝi.

Sed nun, ĉiam pligrandiĝante, la Polusa glaciejo komencas disiĝi kaj diskarakadi pro la tro grandega premado de siaj supraj amasoj. Baldaŭ tempo venos, kiam la malsupraj partoj plu ne povos subteni la tiel grandpezajn suprojn, kaj la plej granda parto el la kolekto enfalos la maron. Tiu subita redono de tia kvanto da glacio eltirita el oceanoj dum centjaroj, multe pli-altigos la marojn, al kiuj nur restos unu rimedo por rebeniĝi: subakvigi kontinentojn kaj eniri Nordan duonsferon.

Kia estos tia katastrofo? Oni povas ĝin iom figuri al si, esplorante la nunan influon de l' glaciario sur nian planedon.

Ne sole la Polusa glaciario produktis la nunan aranĝon de l' teroj kaj maroj, sed ankoraŭ ĝi influas sur la formadon kaj direkton de aeraj kaj maraj fluoj, kaj sur temperaturon de oceanoj. Ĉe l' Ekvatoro, la fundo de l' maro estas nur je du aŭ tri varmaj termometrogradoj, tiam kiam la supraĵo montras almenaŭ 25 aŭ 30. Rimarku, ke la malo devus ekzisti, ĉar la fundo mara estante pli proksima de l' centra fajro, ĝi devus sekve esti ankaŭ pli varma. Tiel, en la plej profundaj partoj el la karbotruoj Westfaliaj, oni devus baldaŭ ĉesi ĉian laboron pro la tro granda varmeeco. Se mala fenomeno ekzistas en la Ekvatoraj maroj, oni povas konkludi, ke ĝi devenas de l' estado de l' Polusa glaciejo, jam radie malvarmiganta la ĉirkaŭajn akvojn.

Grandega do estas jam l' influo de tiu amaso el glacio kiu povas detrui funde de l' maro la varmegecon de l' sunaj radioj. Kia do ĝi estos, kiam la montoj ekmoviĝos kaj alproksimiĝos al ni! Dank' al la sulkoj fositaj de la nunaj « iceberg »-oj oni jam konas ilian estontan vojon. La detruonta ondo, el la maro de Waddell, inter la teroj de Graham kaj de Enderby, alkuros al la bordoj de Brazilujo kaj de Afriko, kaj tra Anglujo kaj Norda Maro iros alfrapi la glacian muron de Norda Poluso. Precipe Anglujo, Holando, Danujo, Finnlando, suda parto de Svedujo kaj nord-okcidenta de Rusujo subakviĝos. Tiam, reveninte sur sian vojon, akvoj superos ebenaĵojn de Polujo, Germanujo, Hungarujo, Francujo k. t. p. k. t. p., ne forgesante aliajn partojn el la mondo. Nur restos kelke da insuletoj, antaŭaj suproj de plej altaj montoj

« Kiam okazos tia katastrofo, ni ne povas scii, » aldonas S-ro Lewis, « sed estas tiel

certe ke ĝi fariĝos, kiel oni povas diri ke *du kaj du faras kvar.*»

Kompreneble tia teorio naskis fulmotondrojn en diversaj sciencaj akademioj Eŭropaj kaj Amerikaj. Oni povas ĝin jesi aŭ nei, oni tamen ne povas tute sin garantii kontraŭ ia tremeto kiu . . . glaciigas ĝis ostoj. Ĉu estus tio konfirmo de malnova antaŭdiro farita en la XII aŭ XIV

centjaro pri la estontaj Papoj en Romo, kiu pretendas, ke nur ankoraŭ dek Papoj estos de l' morto de Leo XIII ĝis la lasta juĝado?

Brrr! . . . Plezure oni aranĝas montojn da brulligno en la kameno, atendante tiajn montojn da glacio, kaj demandante sin iom malkvietete:

«Post kiom da tempo?»

O. Wood.



FOR LA VIANDON!

— De *Sipolusz.* —

Dion mi benas pro tio ke mi povis veni por loĝi en tiun ĉi malgrandan, antaŭurban domon. Sole al la okazo mi dankas pri tio ĉi.

Unufoje mi tagmanĝis en malgranda, sensignifa restoracio. — Apud mi sidis maljuneta, bonevestita sinjoro, kiu, kiam mi sidiĝis, manĝis kukuman salaton kaj trempadis panopecetojn en ĝian vinagron kvazaŭ ĝi estus el vianda lardo.

Mi regalis min per kariofilsupo, poste mi ordonis unu porcion da spinacaĵo, — poste ankoraŭ unu porcion da spinacaĵo, kaj mi trinkis puran akvon . . . kion fari? Mi ne havis sufiĉe da mono por tagmanĝi ian viandaĵon.

Tiam mi rimarkis, ke la «kukum-salatulo» akompanas kun akra atento mian modestan manĝon. Kiam mi finis ĝin, li alparolis al mi:

— Ĉu via sinjora moŝto estas vegetomanĝisto?

— Jes.

(Kion diri? — mi hontis konfesi al li mian malriĉecon.)

— Kial vi estas tia?

(Eĉ se mi tia estus, mi ne povus argumenti.)

— Mi ne povas manĝi ion kion oni ricevas nur per mortigo de vivanta estaĵo, — mi diris subite, mallonge sed konvenege.

— Brave, junulo! Kaj kial vi ne trinkas vinon?

— Mi ne prenas tian trinkaĵon, kiu povas eksciti la homajn malbonajn kapricojn kaj ecojn.

— Tre ĝuste. Vi estas bravulo. Kian profesion vi havas?

— Mi estas oficisto de la urba depagofico.

— Ĉu vi havas loĝejon?

— Jes.

— Ĉu vi ne deziras ĝin forlasi?

— Kial vi demandas tion ĉi?

— Ĉar en mia domo estas ankoraŭ unu loĝejo, kiu estas malkare luebla de

bonmorala, sola junulo, — respondis la maljuneta sinjoro.

— Kion vi komprenas per *bonmoralo*? Apartan enirejon el la ŝtuparejo?

Li surprize rigardis min.

— Kredeble vi antaŭ nelonge fariĝis viandon-ne-manganto, alie vi ne parolus tiel... Kion mi komprenus? mia loĝanto estu vegetmangisto.

— Ĉu vi estas tia?

— Mi estas ĉiama honora prezidanto de l' Societo de la Vegetmangistoj, kaj la plej energia apostolo de la vegetajano. Ĉu vi ne aŭdis ankoraŭ pri Tobias Müller?

— Vi... vi estas do Tobias Müller? Sinjoro, permesu al mi, ke mi levu mian rigardon kun la plej granda respekto sur viajn harojn blankiĝintajn en la kreskaj-mangado.

— Levu ĝin. Nu, ĉu vi volas fariĝi kunloĝanto.

— Sendube. Kiam mi povus iri?

— Tuj.

— Ni iru.

— Kaj via apartenaĵaro?... .

— Tio ĉi ne estas grava.

Post duonhora mi estis en la nova loĝejo. Bela, afabla domo, kun malgrandaj, sed puraj loĝejoj, en kiuj ekskluzive vegetajanoj loĝis. Mia ĉambro estis aminda, gusto meblita; sur la muroj pendis portretoj de nekonataj homoj, — apostoloj de la viandon-ne-manganto, kiujn la viandon-mangantaj barbaroj kuiris eble en oleo aŭ trempis en varmegan peĉon.

La ĉambro kostis ses florenojn ĉiunmonate, kaj sekrete mi deziris, ke estus bone, se ĉiuj budapeŝtaj dommastroj fariĝus vegetajanoj.

Ĉiuj kunloĝantoj akceptis min kiel fraton, kaj ni reciproke konsentis en ĉio, kiel

la unuaj kristanoj en la jarcentoj de l' persekuto.

En la mateno de la sekvinta tago bela knabino portis al mi kakaon. Por danki mi volis kisi ŝin, — sed ĝustatempe mi rememoris, ke mi devas rifuzi ĉiaspecan viandaĵon.

— Kiu sendas la kakaon? — mi demandis de la knabino.

— La dommastro. Tio ĉi okazas ĉiutage, por ĉiu loĝanto.

— Ĉu oni ne devas pagi por ĝi?

— Ne.

Bonege! Kredeble la nova religio tre baldaŭ disvastiĝos kaj la kakaofabrikistoj estos la plej riĉaj homoj de l' mondo.

Ĝis nun mi pagis 30 florenojn ĉiunmonate por loĝado, sekve la vegetajaniĝo pligrandigis je 24 florenoj mian salajron. Kion faros el tiu ĉi mono la junulo, kiu havas pli multajn ŝuldojn, ol li povus ilin elpigi kaj komenci la partumajn pagojn? Li plibonigos la sinnutron. Mi abonis tagmangon je 18 florenoj en urboflanka restoracieto kaj tie mi mangis tiom da viando kvazaŭ leono.

Tamen, kiam mi renkontis Tobiason Müller, mi ruĝiĝis; ĉar la restoj de l' konscienco ekzistas ankoraŭ neneigeble en mi. Akran rigardon li ĵetis al mi el siaj grizaj okuloj, sed nenion diris.

Mi sentis la neceson: firmigi mian pozicion. Mi aĉetis per unu floreno lardon fumajitan, kaj mi portanta ĝin iris al sinjoro Müller:

— Sinjoro, — mi diris. — Mia patro estas vilaĝano kaj la vegetajanoj senefike forflugas super li. Vane mi instigas lin, li ne sekvas nin; li eĉ volas min eltiri, — jen li sendis al mi tiun ĉi lardon, kiun mi transdonas al vi kiel signon de mia fideleco kaj firmeco.

Larmoj aperis en la okuloj de Müller.

— Mi dankas, junulo. Ni kondamnos tiun ĉi lardon kvazaŭ rifuzindan malamikon. Solene ni bruligos ĝin.

— Ne faru tion, sinjoro Müller, ne re-veku la dormantan leonon; pripensu nur: rostita lardo . . . ha, mia Dio!

Kaj mi eliretigis trifoje mian langon. Sinjoro Müller laŭte kalkulis la nombron de l' eliroj, poste li severe diris:

— Aj, aj, junulo, ŝajnas ke en vi jam revekiĝis la dormanta leono.

Mi ekkaptis lian manon:

— Sinjoro, — mi diris senteme, — ne similigu min al la plej terura viandon-manganta monstro. Veku en mi la kamelon, la bovon, la kapron, la kenguruon, sed lasu la leonon.

— Bone, mi vidas, ke vi estas fervora samideano. Metu la lardon sur la tablon.

Post tiu ĉi sceno dum pli longa tempo mi ne renkontis lin.

Unu fojon mi decidis, ke mi esploros la lignejon apartenantan al mia loĝejo. Brulantan kandelon mi prenis kaj iris en la kelon.

Kiam mi senbrue trairis sur la mola fundo de l' malluma antaŭkelo: prezentu al vi, kion mi vidis tra la ligna kradaro de l' barilo? Sinjoro Müller sidis sur unu barelo kaj li bonhumore «lardadis»; li mangis mian lardon.

— Bonan apetiton, sinjoro Müller! — mi diris kviete kaj sidiĝis apud lin.

En la sekvinta minuto mi tranĉis pecon da lardo el la tutaĵo kaj komencis ĝin mangi kun la plej natura mieno.

Sinjoro Müller rigidite de surprizo rigardis min dum unu momento, poste li rekonsciigis kaj diris:

— Ki . . . kion? ĉu vi mangas lardon?

— Kompreneble! Ĝi estas ja *vegetaj-lardo*; alie vi ne mangus ĝin.

— Sendube, ĝi estas nerekte vegetaja mangajo.

— Kiel?

— Ĝi estas farita el la viando de vegetmanganta besto.

— Nu?

— De porko. Ĝi mangas glanojn, branon, maizon, terpomojn kaj kukurbojn. Unuvorte: ĝi estas samideano.

— Vere; elkalkulante la glanojn kaj la branon, ĉar tion ĉi ni ne mangas.

— Vi estas prava. Sciigu, ke la progrespartianoj signife faciligis la dogmojn.

— Vi estas do progrespartiano?

— Jes; kaj tiujn bestojn, kiuj mangas nur kreskajajn nutraĵojn, mi ne kunkalkulas kun viandomangajoj.

Subite sinjoro Müller furis rifuziĝan ekmovon per sia mano:

— Eĥ, eksciigu ĉion: — mi fariĝis eks-sektano.

— Ha!

— Nia prezidanto subite mortis kaŭze de apopleksio. Tiu ĉi cirkonstanco pruvas, ke la vegetajismo ne asekuras kontraŭ apopleksio. Kaj, ĉar mi fariĝis vegetajano nur pro la timo de l' apopleksio, tial mi eks-samideaniĝas. Morgaŭ mi eĉ malfondos la domon. Ankaŭ vi pagos de la unua de l' venonta monato 25 florenojn por la loĝejo. Bonan tagon!

La sekvintan tagon li sciigis la loĝantojn per cirkulero pri la ŝanĝo.

Kaj la unuan de la sekvinta monato mi rekomencis tagmangadi kariofilon kaj spinacajon; kaj mi tuj refariĝis vegetajmanganto, kiam mi ĉesis esti vegetajano.

MI SONGĪS . . .

Mi songĭs: mi estis la suno
Kaj banis la aron-radi'
En maro, kaj tiu ĉi maro —
Ĝi estis l' okuloj de vi.

Mi songĭs: mi estis Kronido
Kaj trinkis kun ĝojo de di'
Nektaron el ora pokalo —
Ĝi estis la lipoj de vi.

Mi songĭs: la pord' de l' edeuo
Malfermis sin larĝe por mi,
Kaj tio ĉi estis la brakoj,
La brakoj diinaj de vi.

Amiko.

 TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

KRONIKO.

El Rusujo.

En Tomsk. Ĉar la nombro de niaj partianoj ĉiutage pligrandiĝas en la Tomska regiono, esperantistoj sendis al la Societo «*Espero*» skribopeton por ke ĝi permesu fondi filialon en Tomsk. Esperu ni ke tiu ĉi projekto efektiviĝos.

*

En Vladivostok. S-roj Petrovskij kaj Postnikov fondis filialon de «*Espero*». Ili organizis tre sukcese Esperantistajn vesperkunvenojn, kaj estus tre dankaj al ĉiuj personoj, kiuj povus sendi al ili multajn fremdajn korespondojn. Tio tre helpus ilian propagandon. Sin turni al: Societo «*Espero*», str. Lazarevskaja — domo Postnikov, en Vladivostok, Azia Rusujo.

*

En Narva. S-ro H. Štalberg sciigas al ni, ke la 23-an de decembro lasta s-ro Tenison paroladis pri Esperanto en la Esta societo de sobremegistoj *Wõitleja* en Narva. La parolado estis akceptita de la ĉeestantoj

kun plaĉo. — Tie ekzistas rondeto Esperantista.

*

La gazetistaro. En la lasta tempo multaj rusaj ĵurnaloj parolis pri nia afero. S-ro Kurmanajev sciigis al ni la sekvantajn: *Nanĉnoje Olozrenie* (Scienca ĉirkaŭrigardo) presis tradukon de artikolo el *Przeglad Filozoficzny*, kiu estas tre favora por Esperanto.

La ĵurnalo *Mir Boĵy* (La Mondo Dia) ankaŭ tre favore skribis pri nia lingvo.

Novoja Vremja (Nova tempo) enhavis artikolon de l' redaktoro mem pri la lingvo internacia, kie la aŭtoro analizas artikolon de S-ro Breal, kaj tre favore parolas pri nia entrepreno.

La gazeto *Russkij Listok* (Rusa folieto) presis artikolon de sia Pariza korespondanto, kiu tre rave parolas pri nia lingvo kaj ĝiaj progresoj en Francujo.

El Holando.

Dank' al la agema kaj fervora propagando de nia amiko S-ro Dreves Uitterdijk, Esperanto multe progresas en Ho-

lando. Lia bonega lernolibro por Holandoj sukcesis plej eble, kaj jam la tieaj Esperantistoj intencas fondi klubon kaj eldoni lernjurnaleton. S-ro D. U. sendis artikolojn kaj cirkulerojn pri Esperanto al ĉiuj gazetoj holandlingvaj, en Eŭropo kaj en Azio. Multe el ili parolis pri nia afero; ni citas ekzemple «Amersfoortsche Courant», kiu petis mem pri dua artikolo.

S-ro D. U. ankoraŭ konvinkis la tiean estintan propagandantestron de *Volapük*, kiu estas nun lia plej fervora kunlaboranto.

Ni estas certaj, ke ĉiuj Esperantistoj ĝojos pri la sukcesoj de nia amiko, kaj kun granda intereso sciigos pri lia agado.

El Germanujo.

Eho. En nia antaŭa numero ni parolis pri la artikolo prosita en la *Allgemeiner Anzeiger für Druckereien*. Je tiu artikolo respondis en la n-ro 51 de tiu sama gazeto nia fervora samideano D-ro Ad. Ebner. Li elmontras en sia artikolo tre sagace la malpravon de l' aŭtoro; precipe li tre saĝe, ni povas diri: science, argumentas kontraŭ tiu diro de l' aŭtoro, ke «Esperanto ne taŭgas esti lingvo universala, ĉar ĝi ne estas germankarakterata».

La artikolo de D-ro Ebner estas skribita en tre delikata stilo kaj faras bonan impreson en la leganto.

Kiel D-ro E. sciigas nin, li jam ricevis — dank' al la artikolo supredirita — demandon pri nia lingvo.

Por Esperanto.

Ni estas tre feliĉaj, ke ni povas sciigi niajn belegantojn, ke du fervoraj Esperantistoj difinis monon por helpo al diversaj entreprenoj Esperantaj. Por la dua fojo, S-ro *Evstiféieff*, kies antaŭan donacon oni ne forgesis, sendis al ni cent (100) rublojn disdonotajn laŭ sekvanta maniero:

- 1) dudek (20) R. por la nova ĵurnalo «*Beletristo*»,
- 2) dudek (20) R. por «*Lingvo Internacia*»,
- 3) dudek (20) R. por «*Unua Societo de l' Aŭstraj Esperantistoj*»,
- 4) dudek (20) R. por S-ro *Elbër No* (pri fondo de humora gazeto Esperanta); — dua sendaĵo,
- 5) dudek (20) R. por premioj donotaj en literaturaj konkursoj aranĝotaj de Societo por propagando de Esperanto (S. p. p. E.).

*

Aliparte, S-ro *Pavlovskij* sendis al ni:

- 1) dek (10) R. por fondo de rezervkapitale de «*Lingvo Internacia*»,
- 2) dek (10) R. por kvinobla abono.

*

Ni pensas, ke ni esprimas opinion de l' tuta Esperantistaro, tre dankante la suprenomitajn Sinjorojn, kaj sincere ilin gratulante pri ilia malavara ofero. Ili ja tiel permesas al bonvoloj pliefiki, kaj multe helpas progresadon de nia kara lingvo, kies tuja sukceso fariĝas, se ni ne tiel mankus la utilegan «*nervon de l' militado*», nome: monon.

≡ Pro manko da spaco ni devas prokrasti ĝis venonta numero multajn sciigojn, aparte el Svedujo, Bulgarijo, Kanado, Peruo, Francujo k. c.

Pri konkurso literatura.

Por pligrandigi la nombron de la literaturaj verkoj de l' «*Biblioteko*», ni intencas malfermi konkurson literaturan inter ĉiuj abonantoj de L. I.

Por ke tiu ĉi konkurso kiel eble plej bone plenumu dezirojn de Esperantistoj, ni petas niajn legantojn, ke ili volu sendi al ni per poŝtkarto sian opinion pri la estonta kampo de l' konkurso kaj la donotaj premioj. Tion ĉi ili volu fari plej baldaŭ, ĉar ni presos la regularon dum aprilo.

Provizore, ni proponas fondi du sekciojn.

La unua enhavos verkojn prozajn, pri kia ajn objekto, **originale verkitajn en Esperanto**. Ilia amplekso devas esti almenaŭ 16-paĝa, kaj ne pli ol 32-paĝa, laŭ la formato de « *Biblioteko* ».

La dua sekcio enhavos nur rakontojn aŭ teatraĵojn **tradukitajn**. Ĉiu rakonto aŭ teatraĵo devos superi 32 paĝojn.

Ni rediru, ke tio ĉi estas nur provizora. Ni atendas opinion de niaj legantoj mem.

La Redakcio.



DIVERSAĴOJ.

PROPONEJO.

—o—

Ni ricevis de S-ro Pavlovskij la sekvantan leteron :

« Kara Sinjoro — Al mi ŝajnas, ke estus juste nomi la rezervan kapitalon de L. I.

« **Rezerva kapitalo W. H. Trompeter** ».

Kvankam mi scias, ke tiu ĉi institucio apartenas plene al via persona iniciativo, mi tamen esperas ke mia propono ne faros al vi malbonan impreson. Memorado danka pri la nobla kaj sindonema homo, kiu tiel multe faris por Esperanto, ne devus esti malbona afero sub ia ajn formo, kiun oni volus. Cetero tio ĉi estas mia persona opinio . . .

« La sciigo pri aranĝota Ekspozicio en Belgujo dum 1902-a j. rememorigis min pri la Pariza Eksp. en 1900. Mi konfesas al vi, tiu ĉi lasta Eksp. ne tute bone estis aranĝita, por ne diri ion pli fortan. La Ekspozitaĵoj, krom amaso da leteroj, konsistis nur el malgranda nombro da broŝuroj, kelkaj lernolibroj, 1 aŭ 2 ekzempleroj de l' esperantaj ĵurnaloj. Eĉ, sincere konfesante, mi ne tre bone memoras, ĉu mi vere vidis tiujn ĵurnalojn. Estas kompreneble per si mem ke tia Ekspozicio ne povas trovi multan influon sur la « gran-

dan publikon ». La estonta Ekspozicio devus enhavi ĉiujn eldonitaĵojn esperantajn, komencante de la unuaj. Sed ĉar neniam el la nun ekzistantaj Societoj, Rondetoj kaj Grupoj posedas ĉiujn aferojn presitajn en Esperanto, esperantistoj do devas veni por helpo, kaj fari sian laŭfortan kunagon.

« Volu akcepti, kara Sinjoro . . . k. c. Ŝostka, Rusujo. *N. Pavlovskij.* »

*

La unuan proponon de S-ro P. ni volonte konsentas. Vera devo estas ja ion fari por daŭrigi inter Esperantistoj memoron pri S-ro W. H. Trompeter, la tiel sindonema subteninto de Esperanto, kies morton niaj legantoj konas, dank' al artikolo de D-ro Zamenhof, presita en la n-ro oktobro-novembra de L. I. Tiu propono de S-ro P. estas tiom pli laŭdinda, ke li mem fondis nian Rezervkapitalon . . .

Pri la dua propono, nur restas nun al Esperantistoj diri sian opinion, kaj al niaj Esperantistaj kolegoj diskonigi la suprediritan ideon.

S-ro Radvan-Ripinski sribas al ni :

Estimata Sinjoro Redaktoro! Permesu al mi uzi « *Lingvo'n Internacia'n* » por diskonigi la sekvantan projekton, jam aprobitan de S-roj de Beaufort, Lallement kaj Bernot.

Mi pensas ke estus utile eldoni « *Muzikkajeron por Esperantistoj* ». Tiu ĉi kajero, kun formato de albumo,

enhavus kolekton* de Esperantaj kantoj, kun muzikaĵo apuda.

La kantoj, povus esti, ekzemple: Himno Espero, Kanto al la flago de l' paco, Nia lando, kaj aliaj, kiuj troviĝas en la «Liro de Esperantistoj» de S-ro Grabowski: Maristoj, Anĝelo, Preĝo, Velo, Kanto de studentoj (Gaudeamus igitur). Ĉiuj ĉi kantoj estas jam kunigitaj kun muziko.

Muziko, jam de longe vera internacia lingvo, estas — permesu al mi la esprimon — «frato rilate al Esperanto» tiom pli ke ili ambaŭ melodie kantas kaj «adoneissent les mœurs» kiel diras Francoj.

Esperu ni ke baldaŭ ni povos montri al ĉiuj per agrablaj vesperkunvenoj muzikaj kaj teatraj, ke Esperanto plu ne estas artefarita, sed vere viva lingvo.

E. Radvan-Ripinski.

(En Lodejnoje-Pole, Gub. Oloneckaja, Razjezjaja str. dom de fratoj Nazarov.)

En niaj plej baldaŭ venontaj numeroj, estos inter aliaj, la sekvantaj artikoloj:

Pri la blinduloj kaj Esperanto de S-ro P. Ahlberg. La horo de la vespermanĝo de l' Esperantista Grupeto en Samoëns. Gazetoj Rondirantoj de P. Bavay. Letero el Japanujo, Hispana legendo, Historio de ŝtelo, Kormovoĵ de ruĝa perdrikido k. t. p. kaj diversaj verkoj kaj tradukoj de S-roj Radvan-Ripinski, N. Levitskij, Rakitski, Altenburger, Vejtcler, Beau, Sam, Sjemjonov, Amiko, k. a.

INFORMEJO DE ESPERANTISTOJ.

Leginte la funebran sciigon pri la morto de S-ro W. H. Trompeter, mi profunde malĝojiĝis. Krom tio, ke la multsavinta mortinto en tre danĝera momento subtenis nian aferon, li kondukadis ankoraŭ tre vivan korespondadon kun tiamaĵ Esperantistoj. En mia fremda korespondajo, mi trovas kelkajn liniojn de la neanstataŭebla mortinto, kiujn povis skribi nur sindonemulo lasanta paroli sian koron... Estas vere, ke kun S-roj Einstein kaj Trompeter, Esperanto perdis gravajn progresilojn.

Miajn korajn kondolencojn al la kompatinda familio de W. H. Trompeter!

Ĥr. Popov (Bulgarujo).

AL ABONANTOJ DE «BELETRISTO».

Kore dankante ĉiujn esperantistojn, kiuj abonnis «Beletriston», mi sciigas ilin ke, bedaŭrinde, mia ĵurnalo ne povas esti eldonata en la nuna tempo.

Tial, kiel mi diris en mia artikolo en la n-ro 9 (69) de L. I., mi transsendis tutan abonmonon al S-ro Paul de Lengyel, kiel abonpago por L. I. dum 1902. jaro.

Tamen mi ne lasis mian ideon pri eldonado de tiu ĉi utila ĵurnalo kaj iom poste, kiam cirkonstancoj pliboniĝos, mi eldonados ĝin, presinte antaŭe provan kajeron kaj dissendante ĝin senpage al ĉiuj abonantoj de «Lingvo Internacia».

Kora saluto al miaj samideanoj!

W. Winnicki.

Miavice mi tre dankas s-rojn aŭtorojn, kiuj sendis al mi por «Beletristo» siajn verkojn kaj samtempe mi demandas ilin, ĉu ili deziras ricevi manuskriptojn returne, aŭ atendi ĝis la komenco de estonta «Beletristo»?

Mi esperas, ke la Esperantistoj konsentos helpi nin je niaj klopodoj por progreso de Esperanto.

A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko.

Mi sciigas ĉiujn aŭtorojn, kiuj havis la bonecon sendi verkojn al mi kiel redaktoro, ke la manuskriptojn mi transsendis al la nova redaktoro, kiu estas nun kompetenta decidi pri ilia sorto.

Paul de Lengyel.

HUMORAĴO.

Delikateco. La kuracisto: Nu! kiel vi fartas, mia amiko? — La kliento (timeta): Volu senkulpigi min, doktoro, mi estas sana.

La infanoj. — Kaj via patro, mia juna amiko, kion li faras?

— Ĉion, kion volas patrineto.

Niaj servistoj. La mastrino: Johano! Ŝajnas al mi, ke vi trinkis absinton. — Johano: Eble sinjorino preferas konjakon?

La telegrafo sen metalfadeno. — Oni diras, ke la telegrafo sen metalfadeno estas ia nova elpensitaĵo. Sed tio ĉi ne estas vera.

— Nu?

— La gazeto redaktata de s-ro Y. publikigis jam antaŭ dek jaroj telegrafajojn, kiujn ne alportis metalfadeno.

PROBLEMOJ.

I. De A. Caetano Coutinho.

Mi estas besto; forprenu mian unuan literon, vi trovos mian loĝejon.

II. De K. Ŝidlovskij.

Estas tri bareletoj: 10-sitela vinoplana kaj du malplenaj: 7- kaj 3-sitelaj. Interverŝante vinon per la 2 malplenaj bareletoj, oni dismetu ĝin tiel, ke fine la 10-sitela kaj 7-sitela bareletoj estu enhavantaj ĉiu po 5 da siteloj de l' vino.

— La solvojn de tiuj ĉi problemoj ni presos en la n-ro 3, kune kun la nomoj de l' divenintoj. La solvojn oni sendu al la administranto.

ACÉTYLÈNE * ÉCLAIRAGE

MAŝINOJ — BRULOJ — KORESPONDO

J. SABATIER, 233, rue St. Martin, PARIS.

La Aŭstra Esperantista Societo decidis aranĝi **ekspozicion** jam en la proksima tempo. Je tiu ĉi okazo la Societo petegas ĉiujn Esperantistojn, ili volu sendi al ĝi ilustritajn poŝtkartojn, gazetojn, portretojn k. t. p. La Societo sendos po unu ilustr. poŝtk. al ĉiu sendinto.

Esperantista Societo, Brno (Moravujo).

Eliris el la presejo :

MALGRANDA KALENDARO . . .
 . . . POR ESPERANTISTOJ
 1902.

Kosto (kune kun transsendo): fr. 0,55,
 aŭstr.-hung. kron. 0,60, skand. kron. 0,45,
 rubl. 0,20. Ricevebla de juvelisto

H. ŠTALBERG,

en Vezenberg (gub. de Estland),
 Rusujo.

Poŝtaj markoj de kia ajn lando estas akceptataj.

***** Esperanto-ŝercoj *****
 en vortoj kaj figuroj.

Ungherrarnes Egen (Gazeto propra de la Fraŭloj).
 Svedujo, invitas por abono la mondon Esperantan.

Ungherrarnes Egen eliras en 1902. j. 26 fojojn.
 Ĉiu numero estas sendata en banderolo.

Kosto por jaro: 2 kr. 88 oer. (4 fr.), du ekz. 4
 kr. 32 oer. (6 fr.) — Provan numeron senpage.

Adreso: UNGHERRARNES EGEN, Askersund,
 Sverige.

Tri poŝtmarka-kolektistoj deziras inter-
 ŝanĝi **Finlandajn poŝtmarkojn** kun ekster-
 landaj kolektistoj. Oni sin turnu al

S-ro Aug. Th. Laurén,
 en JYVÄSKYLÄ (Finlando).

! Mi havas por vendi **mielon** de mia propra abelujo. !

Russie. St. Raŭni-Lesovije, gub. Podolskaja,

I. E. Moskovĉenko.

«Ilustracya Polska»

gazeto por arto, literaturo, sporto kaj rilato de ilus-
 tritaj poŝtkartoj.

Abono por ¼ jaro: 3.90 hung. kr. (3.50 germ. mark.)
 Provan numeron sendas al petantaj per ilustr. pk.

la Redakt. ROMAN v. KAMINSKI, juristo,
 KOLOMEA (Galie.-Aŭstr.)

Interŝanĝoj je lokestampitaj ilustr. poŝtkartoj.

200 rusajn markojn

mi sendas al ĉiu, kiu sendas al mi kel-
 kajn numerojn de ia **filatelista** ĵurnalo de
 sia lando, aŭ **kalendaron** eldonitan por la
 popolo, aŭ la **egalan markon** de kia ajn
 lando.

Gr. T. Kuzmin.

Rjazan (Rusujo), Seminarsk. ul.,
 dom Boĉarova.

Oni abonas L. I.

ĉe

L' administranto de la
 gazeto
 S-ro PAUL de LENGYEL
 en Szegzárd (Hungarujo).

La redaktoro de la gazeto
 S-ro PAUL FRUICHTIER
 27 Boulevard Arago 27
 en Paris (Francujo).

D-ro L. ZAMENHOF
 ul. Dzika N° 9
 en Varsovio (= Warszawa)
 (Rusujo).

S-ro RENÉ LEMAIRE
 Sekretario de S. p. p. E.
 en Épernay (Marne)
 (Francujo).

Kosto de abono por jaro: 5.75 frankoj = 5.50 hungaraj kronoj = 4 skand. kronoj = 4.50 germanaj markoj = 2 rubloj. Unu numero kostas 50 centimojn. Abonoj estas akceptataj de l' komenciĝo de ĉiu monato. Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por ¾ de ilia valoro.

Pago por anoncoj: 30 centimoj = 30 heleroj = 22 oeroj = 24 pfenigoj = 12 kopokoj por duonpaĝa petitlinio; ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. — Pagi por anoncoj oni povas ĉe la kvar suprenomitaĵoj sinjoroj, sed la tekston oni sendu nur al la administranto aŭ al la redaktoro.

AVIZO GRAVA. Manuskriptojn oni sendu nur al la redaktoro, kies nomon oni devas ĉiam skribi. Nepresitajn manuskriptojn ni ne resendas.